
# LA SKOLTA MONDO.

*Trimonata revuo* *Organo de Skolta Esperanto Ligo*




*Volumo 5*
*N-ro 15*

*Aŭtuno 1979*

# SEL

SKOLTA ESPERANTO LIGO
Postbus 433
1500 EK Zaandam Nederlando
Poŝtĝirkonto 54 36 47
****************

Fondita 1918
Fondinto "Avoto" A W Thomson.
Kunfondinto: J W Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, D H Davis, L J VanGulck
****************

CENTRA KOMITATO

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23 c, Oslo 11 Norvegujo. Tel: 02-28 30 35

Vicprezidanto: vakas

Ĝenerala sekretario: J K Hammer, Taxusstraat 7, 1505 AA Zaandam, Nederlando. Telefono: 075-16 69 31.

Kasisto kaj adminstranto de "La Skolta Mondo": D H Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Telefono: 051 928 2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien, Norvegujo. Tel: 035-21 8 48. Poŝtkonto 3 36 33 89.

Membro por Ameriko: P Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Que, H8Y 2N3 Kanado.

Membro por Azio: Ŝindo-Seitaro, Nisi-mikuni-1-tyôme 200, Higasi-yodogawa-ku, Osaka-si Japanujo.
***************

Skolta Esperanto Ligo eldonis
Ĵamborea Lingvo (lernolibro)

Skolta kaj Tenduma Terminaro

Ĵamboreaj Notoj (priparolo de la ĝisnunaj ĵamboreoj.)
Jamboree Story (sama, angla)

Pli vasta horizonto (informa kaj ideo-dona libreto en 9 lingvoj.

# PRO

malsano en la personaro de B E A, kiu presigas nian gazeton, la dua numero por ĉi tiu jaro konsiderinde malfruiĝis.
Ni povus provi eldonon de tria numero ĝustatempe, eble per helpo de alia presejo, por tiel eldoni la kvar numerojn de la jaro. Tiu numero do eble venus al abonantoj antaŭ la numero 2. Tio tamen kostus ekstran laboron, kaj la privataj aferoj de la redaktoro ne permesis tion. Ni do devis trovi alian vojon.

# PRO

tio ni elektis eldoni la trian numeron de la jaro kiel ia duobla numero, kaj ni esperas iel kompensigi la perdon. Tio donis al ni eblecon uzi kvar paĝojn por traduko de artikolo el la nun ne plu aperanta "World Scouting" pri vivo sub-ĉiela en la vintro, kaj tamen havi sufiĉe da loko por la ordinaraj aferoj.
Sed

# PRO

la malsano en B E A ankaŭ konfuziĝis la bildmaterialo por la numero 2, kaj la lasta paĝo de la numero restis tute blanka.

# PRO

ĉio ĉi tio ni petas vian indulgon. Dankon!

Hans Amund.

1909  1979

## NIA PREZIDANTO JUBILEAS NUN

En la 25.a de oktobro 1909 naskiĝis en la Norvega urbo Sandefjord la knabo John Berggreen, kiu en la jaro 1921 aliĝis al la skolta grupo. La skoltaj ideoj kaptis lin, kaj li trapasis la rangojn de ordinara skolto pere de patrolestro kaj trupestro ĝis grupestro. kaj ankaŭ trapasis la plenkreskulan edukon kaj fariĝis Gilwellano.

Ankaŭ la alia, parenca, ideo pri interhoma frateco pere de lingva interkompreniĝo kaj egaleco kaptis lin, kaj li lernis Esperanton en 1932. Ankaŭ en tiu sektoro li tre frue aktivis, kaj precipe en la lastaj jaroj portis sufiĉe grandajn ŝarĝojn: Li estis prezidanto de Oslo Esperantoklubo de 1964 - 1970, fariĝis ĝenerala sekretario de Norvega Esperantista Ligo en 1967 kaj restis tio dum dek jaroj ĝis li en 1977 fariĝis prezidanto de N.E.L.

Kompreneble li trovis la vojon al SEL - la kombinaĵo de tiuj du grandaj ideoj, kaj li aliĝis jam en junio 1932, kaj estis Nacia Reprezentanto por Norvegujo en la jaroj 1932 -41, kaj ĉeestis kaj eĉ gvidis la SEL-kunsidon dum la ĵamboreo en Gödöllö en Hungarujo en 1933, kaj estis kunvensekretario dum la SEL-kunveno dum la kongreso en Varsovio en 1937, kaj partoprenis la SEL-tendaron dum la kongreso en Bern 1939.
Post la milito li ĉeestis la SEL-kunsidon dum la kongreso en Budapeŝto 1966, kaj ankaŭ en Madrido 1969,
kaj fariĝis prezidanto de nia Ligo ek de la 1.a de julio 1970.
Kiel prezidanto li tre aktivis, kaj ĉeestis kaj gvidis la kunsidojn en London 1971, Hamburg 1974 kaj Reykjavik 1977 - kaj ni ne forgesu la ĵamborenon en Norvegujo en 1975.

Kompreneble tio estas nur la ekstera flanko de la prezidanteco, - interne kaj pli "silente" la prezidanto ja ĉefrolas ĉe la konstruo de la pli firma organizaĵo, kies konturojn ni jam ekvidas.

Tial

GRATULON KAJ HONORON

al

NIA PREZIDANTO

JOHN BERGGREEN!

# Akcidento en Alasko.

... Feliĉe la akcidento kun la flugmaŝino super Grenlando okazis ne malproksime de vilaĝeto. Alie la sekvoj ja estus multe pli gravaj...

Nun jam baldaŭ la Eskimoj venis. Zorgoplene ili helpis la viktimojn kaj transportis ilin al siaj hejmoj.

La vundoj ĝenerale estis nur negravaj, sed la situacio de la tiel afabla sinjorino Farun donis al ni multajn zorgojn.

Nepre ŝi bezonis medikamentojn por sia malsano, kiu nun ege graviĝis, sed tiuj medikamentoj malfeliĉe estis netroveblaj post la akcidento.

Kiam Johano priparolis tion kun Kluk, la estro de la eskimoj, tiu decidis sendi Johanon kun du eskimoj al la urbeto ĉe la marbordo, kie estas malgranda hospitalo.

En la frua mateno la grupeto ekiris. Ok fortaj polushundoj tiris la sledon kaj sufiĉe rapide oni traveturis la neĝejon.

Post kelkhora vojaĝo la hundoj bezonis iom da ripozo, kaj oni haltis apud monteto.

Nun Johano bone povis konstati kiel bone la hundoj povas vivi en tiu minace terura naturo.La dika pelto bone ŝirmas ilin kontraŭ la malvarmo. Jes,eĉ ĝi donas tiom da varmo ke la neĝo fanĉis sub la kusantaj bestoj.

En la vespero oni atingis la urbeton kie Johano povis ricevi la necesajn medikamentojn.

Ankaŭ la reira vojaĝo okazis sen akcidentoj.

Tial ankaŭ por Sinjorino Farun la akcidento ne havis severajn sekvojn...!

---

S T R A N G A R A K O N T O

---

Kiam vi finlegis la apudan rakonton, vi eble jam rimarkis en ĝi gravan eraron.

Prave !

En la rakonto ja estas io, kio tute ne taŭgas !

Kiam vi trovis la malkorektaĵon, vi skribu vian opinion al la sekretario de SEL ĝis unu monato post la ricevo de la revuo.

Kaj... ni ĝojus kiam vi aldonus al via letero ian kontribuon por 'La Skolta Mondo': rakonto, raporto, poemo, desegnon aŭ foton aŭ kio ajn.

Eble por la sendintoj estos malgranda donaco

---



VASTAJ HORIZONTOJ

La kajero jam aperis en la lingvoj:

angla
franca
germana
hispana
japana
kataluna
nederlanda
norvega
sveda

Mendu ĉe via NR aŭ ĉe S.E.L., postbus 433, NL 1500 EK ZAANDAM.

Prezo: Ned. gld. 1.50 (por 10 ekz. aŭ pli po ned gld 1.oo.

# La MITOJ pri VINTRA TRAVIVO



*M.E. Lamothe*


Michael Lamothe estas 33-jara naturbiologo kiu pli multe vivas en la sovaĝejoj ol en urba laborejo. La artikolon ni trovis en World Scouting, kiu prenis ĝin el OUTDOOR CANADA Magazine.

La plej multaj libroj pri travivado rekomendas sepcialtipan rifuĝejon kiel necesan por la travivado ne nur kiel protekto al la naturelementoj, sed abkaŭ por doni komforton. Sed kvankam tiuj ĉi estas gravaj faktoroj, la jaroj da praktikado konvinkigis min, ke la aŭtoroj de la plimulto el tiuj libroj konstruis nur unu tian, kaj ke ĝin ili konstruis laŭ la planoj de la libro de iu alia por aldoni alian ĉapitron de la propra. Ofte la aŭtoroj uzis dormsakon kaj pro tio iu ajn rifuĝejo taŭgus. Sed se ili ne havus dormsakon, ili verŝajne juĝus la rifuĝejon aalimaniere.

La tipo - "apogujo", estas facile konstruebla se oni povas trovi sufiĉe da ĉiamverdaĵoj. Sed la necesa kvanto da brulaĵoj por teni la varmon se oni ne havas dormsakon, estas enorma. Se la konstruo ne foruzas viajn fortojn, la kolektado de brulaĵoj por 10 ĝis 12-hora fajro ilin foruzos. Estus bone, se vi povus meti la brulaĵon al unu amaso, fari fajron, kaj ripozi por ok- aŭ dek-hora dormo. Sed tiel nepre ne estos.


Jen kiel ĝi efikos, se vi estas sola: Vi metas kelkajn sufiĉe grandajn brulaĵpecojn en la fajron. Kiam ĭli ekbrulas, vi sentas la varmon, kaj vi metas vin en la ankaŭ troestimitan dormejon. Vi sentas vin sufiĉe komfortabla. Subite vi estas tro varma en la korpflanko kiu alfrontas la fajron, kaj tial turniĝas aŭ formovas vin iom. Kelkiuj estas tiel feliĉaj, ke ili nun ekdormas, kaj ne vekiĝas ĝis la fajro formortas. Sed tio estas esceptoj, la plimulto turniĝas, movas sin for de la fajro, kaj poste denove alproksimiĝas por havi la senton de komforto laŭ la vario de la temperaturo pro la fajro. Kelkfoje vi endormetas, tiam subite vekiĝas pro via sonĝo, ke vi estas en brulanta domo. Kaj kiam la fajro malpligrandiĝas, vi ĝenerale trairas la kutiman rutinon rakonti al vi mem, ke decas alporti pli el la provizo da brulaĵoj, sed vi decidas, ke tio povas atendi iom. Fine - post maksimume du horoj - vi aldonas pli da brulaĵo - kaj ĉio komenciĝas denove.

Mi malofte dormis komforte en tia apogujo, eĉ en la varmaj monatoj. Plej bone ĝi efikas por grupo de kvar aŭ kvin. Tiam



oni konstruas ĝin ĉirkaŭ profundaĵo natura, tiel ke la fajro povas esti sub la nivelo de la dormlokoj. Oni ne faru la rifuĝejon pli grandan, ol necesa por persono kuŝi en plena longeco. Pordtruo estu en la plej malsupra parto, tiel ke la malvarma aero envenas tie, kaj ne tra la muroj en la dorma areo.
Car tia rifuĝejo malhelpas la aeromovadon, oni bezonas multe malpli da brulaĵoj. Tamen ĝi ne estas la ideala rifuĝejo. Sufiĉe da varmo estas malŝparata por varmi domon dum monato aŭ eĉ pli. Kaj nur parteto de tiu varmo estas uzata. Oni devus konservi iom de la varmo, kaj uzi ĝin iom post iom dum la dormo.
"Bonege", vi diras. "Sed en la sovaĝejo?". Tio estas kiam la rokoj estas la amikoj de viro. Varmigu rokon dum kelkaj horoj kaj surpriziĝu pri la tempo en kiu ĝi redonos la varmon!
Bedaŭrinde ŝtonaj rifuĝejoj ne estas ĉiam troveblaj. Tamen en multaj arbaraj regionoj vi povas trovi sufiĉe da ŝtonoj. Kaj tempo por trovi la plej bonan ŝtonegon kutime donas valorajn rentojn per la komforto.
Tipa bona ŝtonego por rifuĝejo estas 6 - 10 futojn longa, kaj kun unu ebena flanko. Ni nomu tiun la reradian muron. Gi estu minimume du futojn alta, vertikala aŭ oblikva tiel ke la supro pendas ekstere. La tereno apud ĝi estu sufiĉe ebena.


Tio estas bona loko, sed eĉ pli bona ĝi estas, se estas alia roko paralele kun ĝi tri aŭ kvar futojn for. Gi tamen povas esti nur du futojn alta. Se vi trovas moveblajn ŝtonojn, vi povas konstrui trian muron. Tiuj du moroj tamen estas pli lukso ol neceso.
Por varmigi la rokon simple forigu neĝon inter kaj super la reradia(j)n muro(j)n kaj igu fajron liki la rokon dum minimume du horojn. Evitu ŝtonojn kun glacio sur la supro, ĉar tio indikas ke akvo malsekigis la supraĵon dum pli varmaj tagoj, kaj tiu ŝtono povas enhavi sufiĉe da malseko, tiel ke ĝi povas disfali per grandaj pecoj kiam vi varmigas ĝin. Kaj pro tio ĝi ne konservos sufiĉe da varmo por via bezono dum la nokto.
Des pli longe vi hejtigas la rokon, des pli longe ĝi redonos la varmon. La fajro brulu dum vi kolektas pli da brulaĵo, materialon por tegmento aŭ lito, kaj dum vi sekigas vestaĵojn. Noktoj estas longaj dumvintre, tial la kvar-kvin-hora hejtigo de la roko rapide foruziĝos. Ofte la roko redonos varmon dum du-tri-foje pli longa tempo ol la hejtado. Sed kolektu sufiĉe da brulaĵo al nova unuhora fajro kiam la ŝtono ekmalvarmiĝas. Tiu ripetata hejtado estas eĉ pli efika, ĉar la roko jam parte estas varma.
Dum la lasta horo de la hejtado - la unua - uzu malgrandajn pecojn de konifera ligno, kaj komprenebla nur morta, seka lignaĵo



Kiam la brulitaĵo estas for el la put-rifuĝejo, oni konstruu V-tipa framon por porti la kovraĵon de branĉoj.

estu uzata. Tiuj brulas pli pure sen postlasi dikan tavolan da karbaĵoj Kaj atentu, ke vi formovas tiujn karbaĵojn komplete antaŭ ol enmeti la litaĵojn. Povas esti ardo en ĝi!
Branĉoj el ĉiamverdaj arboj povas esti uzataj, sed persone mi ne favoras ilin. Ili enhavas tro multe da malsekaĵoj. Mi preferas grandajn pecojn da ŝelo el mortinta arbo. La ligno de betulo povas forputri, sed la ŝelo restas - escepte de kelkaj insektotruoj. La uzo de ŝelo ankaŭ detruas la naturon malpli ol la detranĉado de branĉoj. Se vi uzas branĉojn, respektu la naturon kaj la ĉirkaŭaĵon. Vi prefere uzu tiujn malaltajn branĉojn kiuj tamen poste mortos pro la natura evoluo.
Poste vi konstruu la tegmenton per helpo de alia fajro aŭ la lumo de la luno. La materialon, kompreneble, vi kolektu dum la tago.
La framon faru el malmultaj sekaj trunkopecoj, kaj supre branĉoj de iuj ĉiamverdaj arboj. Aŭ vi povas uzi grandajn pecojn da ŝelo, se vi povas trovi tiajn. La tegmenton konstruu tiel, ke vi facile povas formovi ĝin dum la nokta rehejtado de la roko.
La oblikvo de la tegmento dependas de la cirkonstancoj. Dum sennuba nokto ĝi povas esti tute plata, kaj tio ŝparas materialon, ankaŭ ĉar la purpozo de ĝi estas nur malhelpi la forflugon de la varma aero. Dum neĝplena nokto ĝi devas esti pli oblikva kaj pli dika, por preventi la trapenetron de degelita neĝo pro la varmo. Tial vi kovru la tegmenton de malsupre tiel ke ĉiu peco da kovraĵo iom kovras la pli malsupran.
Tuj kiam la tegmento estas preta, iru en la liton - kun la piedoj internen. Se la roko absorbis la varmon bone, vi povas demeti viajn plej varmajn vestaĵojn, kaj tamen trovu komforton dum tri aŭ kvar horoj, eĉ dum ekstera - 20 aŭ - 30 gradoj. Sed grave estas, ke vi ne permesas vin fariĝi tiel varma, ke vi ekŝvitas.
Por eviti, ke la piedoj ŝvitas, mi ofte demetas la ŝtrumpegojn. Se ili estas malseketaj, mi metas ilin al la ŝtono, ke ili tute sekiĝu. Se viaj piedoj ekŝvitas, vi post kelka tempo trovos, ke dum la korpo sentas varmon, la piedoj estas malvarmaj. Unue vi eble pensas, ke vi trohejtigis la rokon, sed eĉ se ĝi estas vere varma, tio nur indikas ke la varma penetris profunden. Kaj tio estas via garantio por agrabla nokto.

Eble vi vekiĝas, frostetante. Nur resurmetu viajn vestaĵojn kaj movu iom pli proksimen al la roko.
Je tia okazo, vi ne povas ne pensi pri la boneco de la naturo, kiu provizis vin per la necesaĵoj por tia komforto, eĉ se vi devus frosti ekstere. Se vi iam tranoktis tiel sen dormsako, vi pli sentas la kontenton kaj la unuecon kun la naturo. Kaj tio estas multe pli bona ol la ĉiama uzo de brulaĵo en la fajro de la "apogujo", kun la scio, ke la malvarmo enŝteliĝas tuj kiam la fajro ekmortas.
Se vi ne trovas rokojn, vi tamen ne




Por sin teni varma dum la dormo.... oni devas memori kaj sekvi regulojn de prudento kaj la spertojn de specialistoj.
Lano.. donas la plej bonan protekton - eĉ malseka la lano donas varmon. Uzu lanon. Pluraj maldikaj tavoloj donas pli bonan protekton ol unu tavolo same dika: La aero inter la tavoloj izoligas. Ŝanĝu al noktaj vestaĵoj - dum skolta aktiveco tio ĉiam estas eble.
Jen kiel vi faru la liton: A. Tapiŝo. Aŭ tavolo da ĉifitaj gazetoj, da pajlo aŭ similo. B. Plast-ŝaŭmo 150x45x8 mm. Tiu malmulte pezas, kaj vi facile kunportas ĝin. C. Litotuko de vivsavo - nun uzata de ĉiu freŝaera kampadisto. Ĝi pezas 55 g, kaj vi povas havi ĝin en poŝo, sed atentu, ĝi facile rompiĝas. D. Via dorsosako kiel kuseno. F. Viaj tagaj vestaĵoj taŭgas kiel kovrilo.
La nokta vestaĵo estu: 1. Lana ĉapo . 2. Lana trikita bluzo. 3. Pantalonoj. 4. Dikaj lanaj ŝtrumpoj. 5. lanaj senfingraj gantoj.

bezonas uzi la apogujon.
Elektu la plej sekan, sabloplenan lokon kaj elfosu puton du futojn profunda kaj iom pli longa ol vi mem estas. Faru fajtro, minimume ses futojn longan, en la puto. Dum kelkaj horoj, se la loko estis sufiĉe seka, la varmo penetras ĉiudirekten. Forigu ardantaĵojn, kaj igu la surfacon iom malvarmiĝi kaj tiam faru liton. V-forma kovraĵo estu konstruata. Tio igos vin komforta dum pluraj horoj.
Mi havis lernantojn kiuj uzis la ŝtonojn nekorekte. La sono de ili dum la foriro tra la mallumo en la arbaro povus veki eĉ min.. Sperto estas la plej bona instruisto, kaj se ili insistis pri sia formo, mi permesis ilin provi.
Iuj havis la dormlokon pli sube ol la fajro. Komprenebe la malvarma aero kiu enfluis por anstataŭi la varman, preterpasis la dormlokojn kaj malvarmigis ilin.
Aliaj nekomfortablaĵoj devenis de uzo de malseka roko, indikata per glacia tavolo sur la supro aŭ sur la flankoj. Fajro, kiu ne estas tute apud la roko, ne sufiĉe varmigas. Se la fajro estingiĝas tro frue, la roko ne estas sufiĉe varma kaj tro rapide malvarmiĝas.

Unu studento per hakilo, ŝnuro kaj plastikoj faris framon kiu similis al litoj unu super la alia. Li kovris ĉion per sama plasto. Li varmigis grandajn ŝtonojn kaj metis ilin en la suban "liton" dum li mem dormis en la supra, tri futojn supre. Li elŝanĝis la ŝtonojn en ĉiu dua aŭ tria horo, kaj tio donis al li varman, komfortan nokton Sed kiam li volis montri tion al la aliaj, la tuto forbrulis Tamen la principo estis la ĝusta: Kondensu varmon en rokoj, kaj ili redonu ĝin al vi dum la nokto dum vi dormas.
Post kelka eksperimentado ĉiu povas iri en la arbaroj en ĉiu jarsezono sen multekosta ekipaĵo kaj tamen bone dormi. Sed unu li devas lerni kiel kunvivi harmonie kun la naturo. Krome li devas koni siajn proprajn eblecojn kaj malfortojn, kaj li devas havi la scion por preni avantaĝojn kiujn Naturo ofertas. Sed li devas ŝanĝi en la naturo nur sufiĉe por mem iĝi parto de ĝi. Tiam li povas sen pli multo ol alumeto dormi tra nokto kun malvarmo, kaj pro tio trovi la kontenton de la kunvivo kun la naturo.

# INFORMADO

SEL ja celas enpenetradon de Esperanto en la skoltaron, nome por ke la unuopaj geskoltoj ekuzu Esperanton en sia internacia laboro, kaj por ke Esperanto estu aprobata oficiale de la Skolta Monda Oficejoj en Genevo kaj Londono kiel la 3-an (aŭ 4-an por la skoltinoj) laborlingvon, apud la angla kaj franca, respektive la hispana, lingvoj.

Por progresi sur tiu kampo vasta necesas en mia opinio 2 rimedoj, nome

Unue: Fiksitaj laborprogrameroj pri nia ĉefcelo menciita supre,

Due: Efika organizo, kiu povas realigi tiujn programerojn.

Rilate punkto unu jam ekzistas en SEL - almenaŭ parte - sufiĉe da priskribitaj taskoj kaj uzeblaj rimedoj por plenumi la intencon de punkto unu. Sed pri unu de tiuj rimedoj mi persone ne estas kontenta. Mankas ĉe ni necesa informado pri SEL. Tro multaj skoltoj neniam aŭdis pri SEL, eĉ ne pri Esperanto, kaj tute ne atentas la valoron de nia agado. La Centra Komitato kaj nia Sekretariejo ne povas tiun gravan taskon sole plenumi, sed bezonas la helpon kaj kunlaboron de multaj SEL-anoj kaj esperantistoj.

Nia plej utila rimedo sur la kampo de Informado tre verŝajne estas la disvastigo de nia libreto VASTAJ HORIZONTOJ. La nova prezlisto en ĉi tiu numero pri tiu libreto kaj la Speciala Oferto por ĉiuj niaj libroj (kun speciale favoraj prezkondiĉoj validaj ĝis la 1.a de julio 1980) nepre estos bona instigilo por pligrandigi la vendadon, sed VI HELPU NIN!

Rilate al punkto 2 la Centra Komitato ĉiam laboras por plibonigi nian organizon. Per la "Organizplano de SEL", kiun mi ellaboris fine de la jaro 1978, ni esperas pri pli grandaj kaj fortaj sekcioj de SEL en multaj novaj landoj, kie ni nun ne havas reprezentantojn. Tiu pligrandigita organizo de SEL povus esti la fundamento sur kiu ni estonte trovos novajn entuziasmajn kunlaborantojn. - Tial mi petas SEL-anojn, aliajn esperantistojn kaj skoltojn zorgeme atenti ĉiujn eblecojn por trovi novajn reprezentantojn por SEL. Ankaŭ en landoj kie ni nun havas NR, ni deziras pli da kunlaborantoj por establi naciajn sekciojn. Do: Ek al la laboro!

Samtempe mi volas mencii, ke la venonta ĵamboreo (kiun oni nuligis en Irano 1979) okazos en Britujo, verŝajne en 1981. Tia granda manifestacio de internacia skoltado povus esti kampo por pruvi la gravegan valoron de Esperanto inter tutmondaj skoltoj. Ni preparu nin jam nun por denove aktiviĝi en ĵamborea tereno!

John Berggreen

NECESAS!

N I bezonas la JUNULARON ! LA JUNULARO bezonas N I N !

---

Pli ol 20 milionoj da junuloj en ĉ 110 landoj estas membroj de la Skolta Movado.

Kiom el ili estas membroj de nia Skolta Esperanto-Ligo ?

Jes, oni eĉ devas demandi: kiom el ili iam aŭdis pri la ekzisto de nia internacia lingvo Esperanto ?

Kaj por konatigi ilin kun ĉi tiu efika ilo por internacia komprenо kaj amikeco ni ja eldonis nian broŝuron **'VASTAJ HORIZONTOJ'**.



Per la helpo de multaj amikoj ni povis traduki ĝin en 8 diversaj lingvoj.

La antaŭparolon afable verkis D-ro L. Nagy, la ĝenerala sekretario de la Skolta Movado.

Fervoraj amikoj de SEL zorgis por la presado.

Kaj nun...?

Nun estos necesa disvastigi per nia eldono la kono pri Esperanto inter la geskoltoj.

Ni vendu ĝin en tendaroj kaj kunvenoj, ni publikigu pri ĝi en skoltaj gazetoj !

Libroj, miloj da libroj, tute ne utilas kiam ili nur kuŝas en la ŝranko.

Tial ni petas al vi :

Helpu al SEL disvastigi tiun valoran libreton en skoltaj rondoj.

MIRIGAJ ECOJ.

---

Nia libreto havas du mirigajn ecojn:

- ĝi NE estas propagandilo, sed skolta libreto, pri temoj, kiuj interesas al la geskoltoj.
- ĝi TAMEN propagandas nian internacian lingvon en efika kaj longdaŭra maniero

Jam multaj geskoltoj konatiĝis pri Esperanto per ĉi tiu plaĉa libreto. Nun ĝi atingu ĉiujn skoltojn en la mondo !

S P E C I A L A O F E R T O.

---

Por ĉiu kiu volas helpi al SEL en la disvastigo de nia eldono ni nun havas specialan oferton.

Dum unu jaro preskaŭ, vi povos aĉeti ĉiujn niajn eldonojn je tre favoraj kondiĉoj.

- La oferto validas ĝis la 1-a de julio 1980.
- La sendado okazos tuj post ricevo de via antaŭpago.
- La afrankon ni pagos por vi.
- Okaze de elĉerpiĝo vi ricevos vian monon.

- Ekzistas 4 pagmanieroj:
  - al poŝtkonto 54 36 47 de SEL en Zaandam, Nederlando.
  - per internacia poŝtmandato.
  - per monbiletoj en libere ŝanĝeblaj valutoj.
  - per banko al nia konto 58.85.40.560 ĉe Algemene Bank Nederland en Zaandam NUR kiam vi eldonas ? gld. pro la kostoj.
- Por alispecaj mendoj validos la normalaj prezoj.

HAVEBLAJ TRADUKOJ

---

| | |
|---|---|
| **angla** | **Wider Horizons** |
| **franca** | **Horizons Nouveaux** |
| **germana** | **Zu Neuen Horizonten** |
| **hispana** | **Más Amplios Horizontes** |
| **japana** | ひろい視野をつちかい |
| **kataluna** | **Una ampla Mirada** |
| **nederlanda** | **Ruim Zicht** |
| **norvega** | **En Videre Horisont** |

## Speciala oferto.

valida ĝis la 1-a de julio'80

VASTAJ HORIZONTOJ en lingvo(j) laŭ via elekto po 0.75 Ned. gld.
Minimuma mendo 40 ekzempleroj = Ned.gld 30.
Normala prezo po Ng 1.50 !

Favoraj prezoj por aliaj mendoj kiuj okazas SAMTEMPE (ĝis elĉerpiĝo !)

ĴAMBOREA LINGVO la konata lernolibro kiu sukcesas kapti la interesiĝon de la skoltoj po 2.-- Ned.gld.

SKOLTA KAJ TENDUMA TERMINARO instruas al skoltoj la necesajn vortojn kaj esprimojn, kaj al ne-skoltojn la ecojn de la Skolta Movado po 2.-- Ned.gld.

ĴAMBOREAJ NOTOJ Sciindaĵoj pri la Mondaj ĵamboreoj de 1907 ĝis 1975, 32 paĝa plus kovrilo 10 x 15 cm. Ilustrita i.a. per la ĵamboreaj emblemoj. po 0.75 Ned.gld.

JAMBOREE STORY la sama libreto en la angla lingvo, kun informoj pri Esperanto. po 0.75 Ned.gld.

DISKO kun la teksto de la unuaj lecionoj de la skolta lernolibro; 33 t.m.; Ø 18 cm. po 3.-- Ned.gld.

---

## Monda Ĵamboreo en Britujo.

La Skolta Monda Konferenco kunvenis en julio en la Brita urbo Birmingham.

Tie oni decidis ke la venonta Monda Ĵamboreo okazos en Britujo, ĉu en 1981, ĉu en 1983.

Pri la jaro oni ne jam definitive decidis.

Tiel raportis D-ro Arpad Ronai en la kunveno de SEL dum la lasta Universala Kongreso.

D-ro Ronai estas Internacia Komisaro de la Skoltoj de Jamaiko.

## Ĉu vi volas korespondi?

La sekretario ofte ricevas leteroj de geskoltoj kiuj volas korespondi.

Tamen ĝenerale li ne havas adresojn,do li konsilas ke vi sendu viajn petojn al la redaktoro kiu volonte publikigos por vi senpagan anoncon.

Dua averto :

Oni nepre ne forgesu mencii vian aĝon, interesojn, kaj nepre ne vian adreson.

...Kaj bonvolu skribi klare!

# mal~longe

Antaŭ mi kuŝas libro, kies frontpaĝo per grandaj blankaj literoj sur verda fono anoncas titolon kaj la nomon de la aŭtoro. Kaj jen: tiu ĉi lasta estas kio kaptas mian atenton:
AVOTO.
Temas pri poemaro, "Gutaro", de la fondinto kaj honora prezidanto, kiu ja pli frue, jam en 1918 eldonis "Rimvortaron Esperantan", kaj per tio pruvis, ke li scias kiel fari rimojn. Per sia nuna libro li pruvas iom pli - ĉar poemo ne nur estas linioj kiuj rimas, eĉ ne estas nur linioj kiuj havas enhavon kaj rimas - sed estas io ne-difinebla, kio kaŝas sin en la versoj.
Kaj en "Postskribo" Avoto mem provas respondi al tiu demando: Kio estas poesio.
Unu el la poemoj pli frue estis en LSM - la tri-strofa "Knabo" el 1966.
Mi kuraĝas redoni ĉi tie la lastan poemon de la libro - interalie pro la lerta kaj amuza uzo de rimoj:

Vikingo.

Homo sovaĝa, kuraĝa, kaj saĝa,
Bela, kruela, kaj senhonte ŝtela.
Kiel la aglo en vasto ĉiela
Soras feroce de l'vivo enkaĝa,
Prete predema, kun krifo damaĝa -
Tiel vikingo, fiere ribela,
Brave batalis per glavo ŝancela,
Kaj per barketo sin montris vojaĝa.

Kutimiĝinta denaske al montoj,
Fulmo, glacio, marŝaŭmo kaj vento,
Kaj malamikoj batantaj pluroble -
Oni ne miru, ke herorakontoj
Pri li abundas, je ĉies kontento,
Car, primitive, li portis sin noble.

Ankaŭ alia libro - aŭ pli ĝuste kajero - alvenis al la redakcio. La libro de Herman Van Dyck en traduko el la nederlanda de J Koning kaj Esperantostudentoj en la Universitato de Amsterdamo, portas la titolon "Ne tiel, sed ĉi tiel" kaj la subtitolon "Simplaj sugestoj por agrabla kontakto kun blinduloj". La du titoloj fakte donas la enhavon de la tuta libro, kiu per desegnitaj bildoj kaj klarigaj tekstoj vere montras la "Ne tiel - sed ĉi tiel."
La kajero ne estas granda, nur 32 paĝojn. Sed ĝi estas valora - ne malpli ĉar la aŭtoro mem estas blinda kaj pro tio konas - pro persona sperto - kaj la bonvolan, sed humiligan "helpon", kaj la veran helpon. Kaj nun li helpas nin helpi.

Iam venis la episkopo al malgranda vilaĝo, kaj dum sia vizito li ankaŭ vizitis la lernejon por enketi inter la infanoj pri scioj kaj matureceo. Li antaŭe preparis la demandojn, kaj li volis doni al ĉiu lernanto unu demandon. Sed montriĝis, ke li antaŭpreparis unu demandon maltro, kaj kiam li venis al la malgranda knabo li ne sciis, pri kio demandi. Vane li provis elpensi ion kaj fine nur faris jenan demandon:
Cu vi, kara knabo, scias kio estas bruna, kun granda hararo, kaj kio pro ĝojo svingas sian voston? - La knabo iom cerbumis, sed post momento diris: Oni povus kredi, ke temas pri hundo, sed kiam la episkopo demandas, verŝajne iel temas pri Jesuo!

La plej bona maniero propagandi nian ideon, estas praktiki ĝin mem. Kiam iu petas korespondon, ĉu vi respondas?




Almenaŭ du konvinkataj Iamaj Skoltoj en la Eŭropa Parlamento.

Okaze de la elektado de la 10a de Junio por la Eŭropa Parlamento, la nederlandlingva parto de Belgujo, Flandrujo, eletis du eks-skoltestrojn: Leo Tindemans, multfoje ministro, eĉ ĉefministro, kaj Maurits Coppieters, senatano.
Leo Tindemans estas prezidanto de la (flandra) Kristana Popola Partio, kaj ankaŭ prezidanto de la Eŭropa Kristana Popola Partio. Maurits Coppieters estas membro de la (flandra) partio Popola Unio. Tindemans estis subtrupestro en iu vilaĝa skoltgrupo, kaj Coppieters trapasis multajn gradojn en la Flandra Skoltasocio, kiun li forlasis kiel ĉefkomisaro. Ambaŭ nun estas efektivaj membroj de la "Iamaj Geskoltoj-Federacio". Ambaŭ estas ankaŭ "samideanoj". Tindemans simpatias kun Esperanto; li subskribis siatempe la unuan petskribon por-Esperantan al UNO, sed tamen dubas ĉu Esperanto iam estos rekonata kiel "la" internacia lingvo. Li ne konas la lingvon. Coppieters estas pli konvinkata pri la utileco de la I.L., kaj komencis lerni la lingvon.
Belgujo konas jam de longe lingvajn malfacilaĵojn kiuj okazigas bedaŭrindajn disputojn en Belgujo. Niaj du elektitaj reprezentantoj nun ankaŭ pli konatiĝos kun internaciaj lingvaj malfacilaĵoj.

J. Van Gulck

## ĈU VI VOLAS KORESPONDI "SEKRETE"?

Estas multaj manieroj per kiuj vi povas "skribi" en sekreta maniero. Komprenεble vi scias pri diversaj formoj de nevidebla inko, kiu bezonas ioman hejtadon aŭ alian pritrakton por fariĝi videbla. Jen maniero per kiu vi povas "skribi" leteron kaj sendi ĝin - eble sen ke iu alia povos legi ĝin:
Vi aĉetu "leteron" da pingloj - vi konas ilin: Papero en kiu estas multaj pingloj el la speco sen - trua, sed kun "kapo".
Kaj jen vi elprenu kaj aranĝu la pinglojn: Kiam ĝi estas netuŝita, ĝi signifas punkton en la morsa sistemo, se ĝi staras en la kontraŭa direkto, ĝi estas streko. Unu pinglon vi forprenu por indiki la literojn, du por indiki la vortojn.





El Italujo oni raportas:
Skoltoj je diversaj okazoj aktivis: ili starigis ekspoziciostandon, gardservis je ekspozicio de desegnaĵoj promociita de la loka Esperanto-grupo, ĉeestis ĉe arta prezentado de i.a. poemoj de Bagby, Boulton, Kurzens.

El Usono ni ricevis informon pri celebrado de la sepdek jara jubileo de skoltado en Ruslando. La rusa skoltado fondiĝis en la 30.a de aprilo 1909 en Pavlovsk. En 1910 BP vizitis ilin, en 1917 la nombro de skoltoj estis pli ol 50.000. Post la revolucio oni malpermesis la skoltadon, sed daŭre ekzistis sekretaj grupoj ĝis 1927.
Poste oni organizis rusajn skoltogrupojn en fremdaj landoj, sed dum la dua mondmilito ĉi tiuj grupoj devis multloke iĝi sekretaj grupoj. Dum la somero 1979 la rusaj skoltoj en Usono aranĝis jamboreon por celebri la jubileon.

El la raporto el Pollando:
Al la tendaro venis junuloj el ses landoj: Bulgario, Finnlando, GDR, Greklando, Hispanio, Hungario, kaj krome kompreneble en Pollando.
Krome ĉeestis skoltoj el Vieno, kiuj ne estis esperantistoj kaj havis propran programon.
Komence ili maldeziris tendumi kune kun la esperantista junularo, sed poste montriĝis ke iliaj antaŭjuĝoj estis senbazaj.
Tago post tago ili observadis la programon, lingvajn kursojn, naciajn vesperojn, distrajn programojn ktp. de la esperantistoj kaj konvinkiĝis ke la ISET-anoj pli bone interkompreniĝis ol la aŭstraj skoltoj kun siaj polaj kolegoj.
Ĉiu partoprenanta nacio prizorgis programon pri sia lando, tiel oni havis taŭrobatalon, flamenko-dancon, greka vespero kun kantoj de i.a. Teodorakis, ĉardaŝdancon el Hungario kaj tre multaj aliaj programeroj.
La Pola UNICEF-komitato prizorgis prezentadon pri la tria mondo.
Tre grava estis programo pri naturprotektado 'Pereas Migrobirdoj' pri kiu raportos la grava pola revuo "Przyroda Polska" (Pola Naturo).

El la letero :
... La raporto pruvas, ke la praktika aplikado pli valoras ol nur vortoj, ĉu buŝaj, ĉu skribaj...
Kiam mi montris ekzempleron de 'La Skolta Mondo' ili respondis ke en la skolta oficejo en Vieno kuŝas kolekto de tiu revueto, pri kiu ili antaŭe tute ne interesiĝis...

El Pollando ni ricevis raporton pri la 4-a Internacia Skolta Esperanto-Tendaro, kiu okazis 3-20 de julio 1979 en Augustova Laguro apud Bialistoko, kun aldona letero de Pola amiko.
El ili bone montriĝas ke praktikaj ekzemploj multe pli valoras ol sekaj predikoj pri la valoro de Esperanto, kaj tio certe estas lerniga. Ni ĉi tie publikigas nur la ĉefajn partojn el la raporto kaj letero.
La korespondo kun Pollando por SEL prizorgas nia Nacia Reprezentanto en Aŭstrio Franz Schwärzler.

N A C I A J  R E P R E Z E N T A N T O J

| | |
|---|---|
| Aŭstrio | f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden pr. Vieno. |
| | s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz. |
| Belgujo | s-ro L.J.VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 10, B-2200 Borgerhout. |
| | Poŝtk.to Belga Skolta Esp.Sekretario 000-0327460-85. Tlf 031-3688.08 |
| Brazilio | s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, caixa postal 192, 35130 Acesita Mg. |
| Britujo | s-ro David H Withey, 21. Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3ye. |
| Danlando | s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup. |
| Finnlando | s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen. |
| Francujo | s-ro Patrick Deveughele, 53 Av de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne. |
| Germanujo | s-ro Rudolf Fischer, G Adolfstrasse 2, D 4401 Nordwalde. |
| Hispanujo | s-ro S.Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tel 333 80 81. |
| Irlando | s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4. |
| Italujo | s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. Tel 045-525173. |
| Japanujo | s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.16, Suekirotyo Kitatu. Osaka. |
| Kanado | s-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont. |
| | Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45. 10th Ave., Roxboro, Queb. |
| Madagaskaro | s-ro Roger Randrianekena, T.P. - Box Postale 14, Ambatondrazaka. |
| Nederlando | s-ro B.J. Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868. Poŝtkto 3335470. |
| Norvegujo | s-ro H.A. Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien. Tel 035-21848. Poŝtkonto 3363389. |
| Peruo | s-ino J. de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4. |
| Portugalujo | s-ino Maria Teresa Nune Constáncio, Rua Freixo Capitao 16-2º Dto, Agualva-Cacem. |
| Svedujo | peranto: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, S-11233 Stockholm. |
| Svislando: | S-ro Erik Otte, Ecole d'Humanité, CH-6082 Goldern (Hasliberg) |
| Usono: | S-ro Robert W Rapp 2043 Brannon S W, Austell GA 30001. Tf 404-948-8535 |

Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.!): Kotizo inkl. abono:
Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned. gld. 3.30 aŭ egalvaloro.
Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.

Prefere pagu la kotizon al la kasisto: David H. Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3 ye.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.

**********

La Skolta Mondo estas la oficiala revuo de Skolta Esperanto Ligo, kaj aperas kvarfoje en la jaro. Kontribuaĵoj estu sendataj al la redaktoro, Bambleveien 2, N 3700 Skien, plej malfrue ĝis la 10.a de februaro, majo, aŭgusto aŭ novembro.

Ekspedanto de la gazeto estas la kasisto. Informu al la Nacia Reprezentanto je malĝusta adreso, nericevo k.s. Se NR ne estas en via lando, informu al la ekspedanto.

## Renkonto Aŭstrio-Pollando

En la lasta semajno de julio okazis komuna tendaro de aŭstraj kaj polaj skoltoj apud Götzis-(Mäder) en Aŭstrio.

Denove ĝojiga signo de kreskantaj rilatoj inter diverslandaj junuloj.

La Reprezentanto de SEL en Aŭstrio prizorgis ekspozicion. Centran lokon en ĝi havis la salut- kaj gratulleteron, kiun sendis la CK de SEL.

Malfeliĉe mankis la instiga ekzemplo kiun donas la praktika uzo de nia lingvo.



- - - - - - - - - - - - - - - -

Estus bone ke skoltaj grupoj donus pli da atento al la Int. Skoltaj Esperanto-Tendaroj.

Praktika problemo por realigi la partoprenon povus esti ke skoltasocioj ĝenerale nur atentas invitojn, kiuj estas sendataj de la Skolta Monda Oficejo en Ĝenevo kaj la aliĝintaj asocioj sed... lerta skolto povos venki tiun baron !

Pri la 5-a ISET donas informojn ĉu Franz Schwärzler, ĉu Janusz Sulżycki, PL 82-300, ELBLAG, Pk.25

- - - - - - - - - - - -

## Skolta Tendaro en Japanujo

De 2-8 aŭgusto okazis skolta tendaro en Makino (gubernio Siga)

Inter la organizantoj troviĝas la membro de SEL s-ro Kikusaburo ISHII.

Speciala salutletero de la Skolta Esperanto-Ligo estis prezentata dum ceremonio, (kiu okazis la 5-an de Aŭgusto,) en la japana kaj internacia lingvoj.

La ricevo de ĉi tiu internacia saluto forte ĝojigis kaj surprizis la organizantojn.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

* Tiel aktivis SEL-amikoj ambaŭflanke de la terglobo ! *
* Ni invitas ke ankau VI kunlaboru. Kaj... ne forgesu kunporti *
* kvanton de nia varba eldono 'Vastaj Horizontoj' ! *

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -


# LA SKOLTA MONDO

REDAKCIO: Bambleveien 2
N 3700 Skien

NE ISSN 0037 6558



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL